

# HISTORIO

## PRI LA SKISMO EN LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO

---

DOKUMENTARO
KIU MONTRAS LA KAŬZOJN KAJ RESPONDECOJN KAJ PREPARAS LA BAZON POR UNUECA AGADO

★

Verkita de K-do PLATIEL

senŝanĝa represaĵo
de la originala eldono de 1935

**SAT-Broŝurservo**
**Esperanto**
**FR-47470 Beauville**
1994

# ANTAŬPAROLO

La eldono de tiu ĉi broŝuro estas necesa, ĉar unue la aktivaj S.A.T.-anoj nove aliĝintaj al nia Asocio bezonas kompendion pri la plej grava epoko en la historio de S.A.T. kaj due la daŭraj provoj de la malamikoj de nia Asocio falsi la historion de la skismo bezonas refuton kaj detalan prezenton de la koncernaj dokumentoj.

La aspiroj al la unuecigo de la laborista movado ne povas sukcesi antaŭ ol la historiaj faktoj estas rekonitaj de ĉiuj flankoj. Tio ne signifas, ke nin gvidas iu ambicio esti pravaj ĉiuokaze, sed simple la konsidero, ke sen klara malkovro de la kaŭzoj kondukintaj al la skismo, ni estas en ĉiama danĝero refari la samajn spertojn kaj rekomenci la luktojn, kiuj tiom grave malhelpis la disvolviĝon de nia laborista esperantista movado. Se ni ne eliminas tiujn kaŭzojn, tiam la unuecigo de la movado nur povas esti efemera kaj kreos trankviligan iluzion inter la aktivuloj sincere aspirantaj tiun unuecon. La laboristoj, tiom ofte kaj ĝisfunde skuitaj en siaj fido kaj konvinkoj pri la idealoj de la emancipa movado, ne plu senlime disponigos al ĝi siajn fortojn. Oni povas unuflanke detrui tiun moralan forton kaj aliflanke krei tian indiferenton, ke por longa tempo nia movado ne estos rezistkapabla kontraŭ la atakoj de la klasa malamiko. La fido de la laboristoj estas la kapitalo de la laboristaj organizoj. Sed tiu kapitalo foruziĝas, se oni ne scias ŝpareme kaj orde ĝin mastrumi. La gvidantoj de organizoj do unue devas direkti sian atenton al la konservo de tiu ĉi fido kaj neniam peki kontraŭ ĝi.

Kompilante tiun ĉi broŝuron, ni klopodis paroligi nur faktojn, dokumentojn. Ni ne taksas tiom malalta la kapablon de niaj Kamaradoj juĝi mem pri tiuj ĉi faktoj kaj tial ni reduktis la komentojn al la absolute necesa mezuro.

# LA PROVOJ DEPENDIGI S.A.T. DE POLITIKA ORGANIZO

S.A.T., ne estante politika, sed nur klera, eduka, kultura organizo, celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.

*(Ekstrakto el la Statuto de S.A.T.)*

### La fondo de S.A.T. kaj ĝia konstitucio.

Samgrade kun la disvastiĝo de esperanto, kiel rimedo de interkompreniĝo, kreskis ankaŭ la bezono utiligi tiun ĉi lingvon por la apartaj celoj, kiujn starigis antaŭ si la esperantistoj. Estis do tute konsekvence, ke la klaskonsciaj laboristoj forlasis en tiu momento la ĝis tiam « neŭtralan » esperanto-movadon, kiam montriĝis la realigeblo de la apartigo por fondi propran organizon, permesanta apliki esperanton en la servo de la emancipa movado de la laboristaro. Tio okazis en la jaro 1921 en Prago. La fondo de klasa organizo estis prava kaj necesa. Tion pruvas la stato de la « neŭtrala » esperanto-movado, kiu sinsekve riverencas antaŭ la naciismaj idoloj de kapitalistaj kaj faŝistaj ŝtatoj okaze de ĝiaj Kongresoj.

La proleta sektoro de la esperanto-movado rapide komprenis la signifon de tiu ĉi apartiĝo kaj iom post iom kolektiĝis ĉirkaŭ la ruĝverda standardo, tiel transformante S.A.T. en potencan faktoron de la lingva movado. Grandpaŝe S.A.T. marŝis antaŭen... ĝis kiam tiu ĉi sukceso incitis membrojn de politika partio provi enkadrigi la organizon en sian partian movadon. Kvankam la Statuto tian agadon ne permesas, ĉar al S.A.T. rajtas aliĝi ĉiutendencaj Kamaradoj agnoskantaj la klasbatalon, kvankam ĉiu membro aliĝanta al S.A.T. aŭtomate devas agnoski la Statuton kaj revizi ĝin nur laŭ la vojo, kiun ĉi tiu Statuto indikas, tiuj partianoj jam per la unua provo transformi S.A.T. en politikan organizon, pekis grave kontraŭ la Statuto.

### La unuaj atakoj kontraŭ S. A. T.

La unua provo de tia transformo okazis jam en la jaro 1923 fare de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperanto-Unio (S.E.U.), kiu klopodis dependigi S.A.T. de la Komunista Internacio kaj tiel preparis la vojon al neevitebla

skismo. En marto 1923 aperis dokumento en formo de flugfolio kun « principdeklaro de la C.K. de S.E.U. », el kiu ni kopias la esencaĵn partojn (ni lasas senŝanĝe la lingvaĵon) :

*« ...S. E. U. kondamnas ekskluzive per-esperantan karakteron de la agado de S.A.T., kiel falsan kaj kreantan miskomprenojn kaj komplikojn inter ĝia membraro. ...S. E. U. ankaŭ kondamnas idealismajn principojn, kiuj estas ligataj kun la ideo de sennaciismo. ...Idealisma flanko de S.A.T. forpuŝas de si ĉiujn komunistojn-marksanojn, kiuj ne povas ne vidi ĝian naivecon. »*

*« Ankaŭ alia flanko de S.A.T.-organizo kontraŭavertas la komunistojn : ĝia politika malprecizeco. Tio jam antaŭ-kondamnas ĝin al la disfalo aŭ plua reformiĝo. La kriterio pri klaskonscio de revolucianoj ne estas sufiĉa, ĉar en la praktiko anarĥistoj, socialdemokratoj, estas pli danĝeraj malamikoj por la revolucia movado, ol la malkaŝa burĝaro... S.E.U. alvokas ĉiulandajn komunistojn-esperantistojn subteni S.A.T., ĝis estos kreita pli taŭga por la komunistoj organizformo de internacia agado, samtempe senmaskante idealismajn falsideojn de S.A.T. kaj trudante al ĝi pli da vera praktikeco, pli da komunista influo. »*

*« ...Kompare kun S.E.U., gvidata de la komunistaro, S.A.T. prezentas politike-neŭtralan organizaĵon, kies politike-ideologia neŭtralismo estas same kondamninda de la komunista vidpunkto, kiel estas kondamnata de S.A.T. mem la apolitika neŭtralismo de esperantaj organizaĵoj... »*

Alia flugfolio sekvis monaton poste je la nomo de la Komunista Frakcio de C.K. de S.E.U., en kiu, post kiam oni konstatis

« *ĝian* (t. e. de S.A.T. — Kompil.) *nebulan idealisman konceptaron, fakte fortirantan la aktivajn revoluciajn fortojn en la mistikan, reale tute ne fundamentitan, sennaciismon* », sekvas jena konkludo :

*« Ni proponas :*

*« 1. Dum la proksima kongreso de S.A.T. — proklami aliĝon de S.A.T. al Komintern, kaj peti la E.K. de K.I. pri laŭkonforma akcepto; sendi samtempe al E.K. de K.I. raporton pri la disvastiĝo de S.A.T., pri ĝiaj celoj, metodoj de la laboro, nombro de membroj k.t.p... »*

Efektive ĉe la III-a Kongreso de S.A.T. (Kasel, Germanio,

aŭgusto 1923) ambaŭ cititaj flugfolioj estis disdonataj al la Kongresanoj, sed la iniciatintoj devis rezigni pri siaj intencoj post akra diskuto okazinta en la Komunistaj Frakci-kunvenoj de ĉi tiu Kongreso, kie K-do Lanti kaj liaj amikoj — tiutempe anoj de la K.P. — faligis la projekton de la C.K. de S.E.U., antaŭ ol esti diskutota en la publikaj laborkunsidoj de la Kongreso.

Ses jarojn pli malfrue, en 1929, tia antaŭgarda agado (evito de politik-tendenca diskuto en la kongresaj kunsidoj mem) ne plu estis ebla, ĉar intertempe K-do Lanti eksiĝis el la komunista partio. Kaj kun tiu eksiĝo el la vicoj de ilia partio, forvaporiĝis ĉe la kompartianoj la imago, ke S.A.T. troviĝas en « iliaj manoj » (kvankam K-do Lanti neniam celis apliki en la organizo la instrukciojn de la partio komunista).

**La granda paŭzo post la malsukceso (1924-1928).**

Dum la jaroj sekvantaj la Kaselan Kongreson, novaj partiaj atakprovoj ne estis farataj. Tiutempe la C.K. de S.E.U. kaj la partianaro kontentiĝis per la impreso, ke S.A.T., kvankam ne filiiĝinta al Komintern, tamen estas komuniste gvidata. En la gazetoj aperis ĉefe artikoloj verkitaj de komunistoj, ĉar la redaktoro havis en la komunistoj la plej viglajn kaj aktivajn kunlaborantojn. La granda revoluciema ondo, kiu tiuepoke manifestiĝis en la amasoj, neeviteble devis speguliĝi en la vivo de la Asocio. La nove kreita « Esperanto-Servo » de S.A.T., sub gvido de komunista funkciulo, havis kiel taskon disvastigi informojn uzeblajn en la nacilingva gazetaro kaj aspektis preskaŭ specife komunista. Sekve de tio, en la jaro 1924 kaj sekvantaj, okaze de Kongresoj, aŭdiĝis multaj plendoj flanke de nekomunistaj Kamaradoj, kiuj trovis siajn vidpunktojn ne sufiĉe konsiderataj. Tiu ĉi evidenta superpezo de la komunista influo en la Asocio tamen ne kontentigis la parti-komunistojn kaj precipe ne la C.K. de S.E.U., kiu ĉiam estis gvidanta la opozician laboron.

**Nova ekpuŝo : La programprojekto.**

La kompartianoj sekvis novan taktikon, proponante al S.A.T. « programon » kaj deziris tiarimede ankrigi la parti-komunistan influon en la fundamento de S.A.T. *Projekto de programo* estis iniciatata dum la Kongreso en Leningrado (1926); en Lyon (1927) estis elektata program-komisiono, kiu ellaboris projekton kaj ĝin prezentis al la Kongreso en Gotenburgo (1928).

Tie ĝi estis malakceptata kiel *deviga* kaj definitive ĝi pereis en Lajpcigo (1929).

Tiu ĉi projekto atribuis al S. A. T. difinitajn politikajn taskojn kaj havis kiel bazon la *historian materialismon*, kies ĝusto kaj utilo por la laborista movado estas pridubata kaj eĉ kontestita flanke de kelkaj organizoj (ekz. de anarkistoj kaj I.S.K.-anoj), plue la postuloj pri neceso por la proletoj partopreni naci-liberigajn agitadon kaj militojn ne konformas al tiuj de sennaciistoj, kaj finfine eĉ socialdemokratoj ne povis konsenti al diversaj punktoj de la projekto. La malakcepto de la programo do estis prava kaj ĝusta kaj tiel malhelpis la foriron de alitendencaj aktivaj Kamaradoj.

FORMIĜO DE ORGANIZITA OPOZICIO.

Depost la Gotenburga Kongreso (1928) la opozicia batalo alprenis sisteman kaj organizitan karakteron. La riproĉoj al la redakcio de *Sennaciulo*, ke en ĝi « enŝteliĝas tre danĝera ideologio, kiu revizas la klasbatalan kaj proletan pozicion de S.A.T. », sinsekve estis esprimataj de partikomunistoj. Fidelaj al siaj politikaj devizoj, ke « anarkistoj kaj socialdemokratoj estas pli danĝeraj malamikoj por la revolucia movado ol la malkaŝa burĝaro », ili atribuis al si la monopolon pri revolucieco kaj klasbatalo, sin turnante kontraŭ ĉiuj esprimoj de alitendencaj Kamaradoj. Estas evidente, ke S.A.T., dezirante konservi la dekomencan bazon akcepteblan por ĉiu, devis lojale kaj egalmezure cedi lokon en la organoj al diversaj tendencanoj. Ankaŭ Drezen, laŭ kies ordono la sistema batalado, en Gotenburgo, kontraŭ la Direkcio de S.A.T. ial subite estis interrompata, devis deklari — cedante al la argumentoj de la Direkcio — ke

> *« Estas bone, se Lanti sukcesas trovi mezan vojon por ni ĉiuj, kun zigzagoj jen al unu flanko, jen al alia. Se estas tiel, ni dum kelkaj jaroj havu eblon iri kune. »*

Trovi tiun ĉi mezan vojon, tio estis fakte la klopodo de la Direkcio kaj Redakcio. Sed tiu ĉi frazo de Drezen jam lasis antaŭvidi, ke la meza vojo por la daŭro ne estos kontentiga por la Kompartianoj. Ili ne jam sentis sin sufiĉe fortaj por riski la ĝeneralan atakon al la unueco de la laborista esperantista movado.

**Artileria kalibro en Lajpcigo (1929).**

La industria saksa urbo, fortikaĵo de la radikala laboristaro, ŝajnis la taŭga medio por riski novan paŝon, pli energian kaj fortan. Kiel dum la aliaj okazoj, Drezen donis la devizon :

*« La gvidantoj de S.A.T. faris tri pekojn, aŭ krimojn, jes — krimojn, ne persekuteblajn de leĝa vidpunkto, sed tamen estas krimoj — kontraŭ la revolucia tradicio. » « ...Oni provis subŝovi al la marksisma internaciismo ian nebulan « sennaciismon ». ...La Direkcio kulpigis Sovetiajn Kamaradojn, ke ili volas komunistigi S.A.T. Estas malvero. En 1923 mi eble (! Kompil.) eraris, kaj mi efektive faris tian proponon. Sed depost la Kasela Kongreso neniu sovetia esperantisto faris ian provon komunistigi S.A.T. »*

Fine de sia akuza diskurso li proponis al la Kongreso elekti alian urbon kiel sidejon de S.A.T., « kie niaj gvidantoj estu pli ligitaj kun la amaso ».

Kion do alian signifas tiu propono, ol plifirmigi la komunistan influon kaj malhelpi la opini-esprimojn de alitendencaj Kamaradoj? Konforme al la Statuto de S.A.T., kiu diras, ke la celo estas

« ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj klasbatalaj laboristaj partioj kaj sindikatmovadoj; per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj. »

la Direkcio kaj Redakcio ne nur rajtis, sed devis doni lokon kaj okazon por konigi la opinion ankaŭ de alitendencaj Kamaradoj, konsekvence ankaŭ al la sennaciistoj, kies opiniaro plej forte incitis la opozicion.

Dank' al la rezisto kaj refutoj de konsciaj S.A.T.-anoj, ankaŭ tiu ĉi ĝenerala atako kontraŭ la gvidprincipoj de S.A.T. fiaskis kaj la gvidrezolucio, kiu konfirmas denove, ke S.A.T. ne toleru enkonduki disputpunktojn kaj kontraŭstaru ĉiun emon fari S.A.T. unutendenca, sendepende de kiu flanko venos tiu emo, estis *unuanime* akceptata.

**Nova taktiko.**

Ne povante trudi al la S.A.T.-anaro la hegemonion de la Kompartio pere de S.A.T.-Kongresoj, la opozicio elpaŝas al larĝa organizado de la Komfrakcio, kreante en novembro 1929 (nur tri monatojn post la unuanima akcepto de la gvidrezolucio en Lajpcigo!

*Kompil.*) oficialan organon de la Internacia Komunista Esperantista Frakcio (I.K.E.F.), nomata « Kunligilo ». Car tiun ĉi « Kunligilon » ricevis nur frakcianoj, tial la lingvo tie estas pli malkaŝa, pli sincere montranta la veran sintenon de la Kompartianoj rilate al S.A.T. Oni legas :

> « *Fakte por ni S.A.T. estis ĝis nun valora de du vidpunktoj :* 1) *kiel movado frakasanta kaj iom post iom per si anstataŭanta la neŭtralan movadon esperantan kaj* 2) *kiel asocio prezentanta certajn eblojn doni informojn pri la laborista kaj la klasbatala movado al la S.A.T.-anoj kaj per ilia helpo al la laboristoj-proletoj diverslandaj.*
>
> « *La klasbatalaj esperantistoj kaj intelektaj fortoj per ili reprezentataj estas jam nun sufiĉe maturaj por povi ankaŭ memstare, sen interveno de politike senforma asocio simila al S.A.T., daŭrigi la laboron de la frakasado kaj anstataŭado de neŭtrala movado...* »

Parolinte poste pri « fals-Marksista gvidado de S.A.T. » kaj pri « fuŝa oportunisma filozofado », la konspiranto daŭrigas :

> « *Se tiu fuŝado oportunisma daŭros kaj se ni ne povos en la kadroj de S.A.T. ĝin malhelpi, tiam nature ni devos konstati, ke S.A.T. perdas por ni ĉian valoron..., ke ĉiuj klaskonsciaj kaj klasbatalpretaj revolucianoj devas foriri el S.A.T. kaj serĉi novajn vojojn por efektivigi sian revolucian agitpropagandan peresperantan laboron inter la laboristoj diverslandaj.* »

Unuvorte, la S.A.T.-Direkcio dancu nur laŭ la melodio de la Kompartianoj, se ĝi deziras teni ilin en la grego. Ĝi staris do antaŭ la dilemo : aŭ partopreni siavice la skismon per prefero de unu tendenco, forpelante ĉiujn ceterajn alitendencanojn, aŭ obei al la Statuto, eĉ riskante la foriron de la nekontentaj opoziciuloj. Estas evidente, ke la Direkcio, laŭ sia respondeco, povis elekti nur la duan vojon.

**Ekzemplo de komunista gvidado.**

Pro ne sufiĉa singardemo de la nekomunista membraro de Germana Laborista Esperanto-Asocio (G.L.E.A.), la komunista opozicio sukcesis ekkapti la direktilon de G.L.E.A. okaze de la Kongreso en Esen. Kvankam la taskoj de G.L.E.A. estas difinitaj kiel propagandcelaj de esperanto inter la laboristaro ger-

mana, la nova Redakcio de *La Laborista Esperantisto* tre baldaŭ malkaŝe montris la komunistpartiecan tendencon, publikigante akrajn artikolojn kontraŭ la socialdemokratoj kaj sindikatoj aliĝintaj al la Amsterdama Internacio. La partia linio, kiu tiutempe vidis en la « socialfaŝistoj » la plej akrajn malamikojn, kiujn oni unuavice devas frakasi, rigore aplikiĝis en ĉiuj laboristaj organizoj kaj kulturasocioj. Ĉie, kie la Kompartianoj ne sukcesis, helpe de ĉiuspecaj manovroj, havigi al si la gvidajn poziciojn, ili fondis novajn organizojn. Tio validas same por la sindikatmovado kiel por ŝakludantoj. Kial do la esperanta movado estu escepto en tiu kirliĝo de senĉenigitaj pasioj kaj kontraŭraciaj rimedoj?

Ekde la momento de la komunista gvidado de la organo de G.L.E.A., la Asocio, kies celo estis propagando de esperanto inter la laboristaro, fariĝis la tribuno de Kompartianoj por plenumi la devizojn de la Partio. La sekvo de tio estis kompreneble la eksiĝo de ĉiuj nekomunistemaj laboristoj. Ĉu tia gvidprincipararo estus utila ankaŭ por nia Asocio?

### La manovroj ĉe la Kongreso en London (1930).

Akirinte la gvidpozicion en G.L.E.A. la opoziciularo plifortigis sian atakon kontraŭ la S.A.T.-Direkcio. Jam komence de la Kongreso, C.K. de S.E.U. ekspedis bombon en formo de telegramo al la Kongreso :

« *Moscou Y M* 23 93 *W* 4 13 0

« *S.A.T. Esperanto Kongres Conway Hall Red Lion Square Holborn London W C* 1.

« *Lastjare nuna Direkcio kaj* Sennaciulo *faris chion por malhelpi S.A.T. kaj ankaŭ S.E.U. agadon. Nuna Direkcio kondukas S.A.T. al rapida skismo. Proteste agojn de Direkcio C.K. S.E.U. decidis ne utila sian cheeston en London. Alilandaj kongresanoj decidu mem pri situacio. Ni esperas, ke la chikanantoj kaj subfosantoj estos malhelpataj pluen chikani kaj subfosi. Se por la estonta Kongreso estos elektita Moskvo ni faros chion por ke ghi sukcesu. Ni promesas fidelon al nia laborafero. C.K. S.E.U.* »

Pluraj Berlinaj S.A.T.-anoj proponis al la Kongreso okazigi la venontan en Moskvo, kaj el Bruselo alvenis alia propono favora al kongresaranĝo en la belgia ĉefurbo. Ĉar la proponkomisiono sin deklaris per plimulto por okazigo de Kongreso en Bruselo, la opoziciulo Bubu (Boubou) malkaŝe konfesis, ke

*« ...la skismo nuntempe flugas en la atmosfero de tiu ĉi salono. Proponi la Kongreson en nuna tempo al Bruselo, estus organizi la skismon. ...Se vi ne respondos la inviton de rusaj Kamaradoj, eble okazos skismo, kiun oni devas eviti kiel eble plej longe per ĉiuj manieroj. »*

Tiel minacante al la Kongresanoj, la parolinto, same kiel Drezen, aludas denove pri la neeviteblo de la skismo, kies okazigo estis nur afero de oportuno kaj tempo. La Kongreso lojale esprimis *principe* la deziron, ke la XI-a Kongreso okazu en Moskvo, kondiĉe ke orda invito venu el Moskvo. Tiu ĉi invito neniam venis... Cetere pli poste evidentiĝis, ke tiu ŝajn-invito per telegramo estis nur artifikaĵo, atuto en la manoj de la opoziciuloj por venki, super la Direkcio : ja forpasis preskaŭ kvin jaroj, I.P.E. stariĝis kaj tamen *ne kongresis en Sovetio!*

Tiu ĉi Kongreso postlasis la definitivan impreson ĉe la opozicio, ke la S.A.T.-bastiono ne estas konkerebla de partiecaj kaj revizemaj S.A.T.-anoj. Ili do komencis ludi malkaŝe alian atuton, kiu ja certe metis S.A.T. en mortoproksiman situacion, sed finfine tamen ne sukcesis. Ne povante *idee* transformi kaj konkeri S.A.T., la opozicio, kies kerno troviĝis en Moskvo, provis ruinigi la Asocion *materie.*

## LA PROVOJ BANKROTIGI S.A.T. PER RETENO DE ĜIA MONKREDITO

### La monrilatoj kun la Sovetia S.A.T.-anaro.

La speciala ekonomia situacio en Sovetio, kie la tute komerco kun la eksterlando estas monopoligita de la ŝtato, ne permesis rektan transsendon de mono de la individua S.A.T.-ano al la Administracio de S.A.T. La interrilatoj disvolviĝis ekskluzive inter C.K. de S.E.U. kaj S.A.T. La Sovetiaj S.A.T.-anoj pagis siajn kotizojn kaj varmendojn al S.E.U., kiu siavice ĝiris per bankĉekoj la sumojn, permesitajn de la koncerna sovetia instanco. Ĝis la jaro 1930, la interrilatoj estis normalaj, kvankam jam antaŭ tiu tempo nia konto en Moskvo montris kreditan saldon konstante kreskantan. La regula ĝirado de la mono estis absolute vivnecesa por S.A.T., ĉar la libroj kaj gazetoj, presitaj ekster Sovetio, estis pagataj per kontanta mono de la Administracio, kies financa forto-grado dependis kompreneble de la regula mon-alfluo en la kason.

La monŝuldo de C.K. S.E.U. sumiĝas je 12.431 g. markoj (proks. 75.000 fr. frankoj), ne enkalkulante la valoron de la en Moskvo retenita librostoko (niaj tieaj eldonaĵoj). Tiu cifero estas atingita jam en 1930 kaj tia ĝi restis ĝis la hodiaŭa tago.

**LA « FINANCKOMISARO » INTERVENAS.**

En junio 1930 la S.A.T.-Administracio konigis en *Sennaciulo,* ke la Financkomisaro malaltigis la sumon de permesita moneksporto de 4.500 al 4.000 dolaroj jare, kvankam nia membraro en Sovetio montris daŭran kaj altgradan kreskon, kaj same ankaŭ la eksporto de libroj al Sovetio. Tiu ĉi malaltigo jam signifis por la daŭro gravan malhelpon. La ŝnuro, kiun la ekzekutoto havis ĉirkaŭ la kolo, komencis kuntiriĝi... La Administranto en Lajpcigo sendis insistan peton al E. Drezen, ke li uzu sian influon ĉe la koncerna instanco por normaligi la transsendon de nia mono. Jen la respondo :

*Moskvo* 23-V-30.
(Adreso de l' Administranto.)

..........................................

« *Pri la mono de S.A.T. sendota de S.E.U., la stato ankoraŭ plimalboniĝis. Demidjuk pri tiu afero jam skribis al X...* (Ni ne citas la nomojn de tiuj Kamaradoj, kiuj estas ŝtatanoj de faŝistaj reĝimoj. Kompil.) *kaj montris vojon kiamaniere rebonigi la situacion. Vi ja komprenas, ke S.A.T. nun ne estas ĉe ni atentata tiel, kiel antaŭ 3-4 jaroj. Krome ankaŭ mi persone estas metita de parizaj direktantoj en tian situacion, kiam mia persona (ne tiu de S.E.U.-oficiala) interveno por S.A.T. povus ŝajni nur tre stranga.*

*Kun saluto, via* E. DREZEN. »

La 8. junio 1930 Demidjuk, Plenumkomitatano de S.A.T., sciigis nin, ke

« *en majo jam la popolkomisaro oficiale informis la C.K. de S.E.U., ke ĝis oktobro oni tute ne povas doni valuton por transpago kaj nun ni ne povas transpagi eĉ unu dolaron. Ricevinte la rifuzon ni tuj protestis ĉe la superaj instancoj...* »

Tiu ĉi protesto sekvigis konfirmon de la rifuzo.

Kial la popolkomisaro ne donis tiun ĉi permeson de transpago, kvankam dum tiu tempo la regulaj pagoj al aliaj labor-

istaj kulturaj organizoj neniel suferis konsekvencojn de la Kvinjara Plano? Tre simple, ĉar Drezen denuncis S.A.T. al la koncernaj instancoj kiel « flavetan » organizon, neproletan.

**1931 : Malgraŭ permeso, la mono ne venis.**

Niaj gazetoj estis presataj de komunista presejo « Peuvag » en Lajpcigo. Pro manko de mono, kuŝanta en Moskvo, niaj ŝuldoj ĉe tiu presejo kompreneble ŝvelis. Por subteni la « klopodojn » de C.K.-S.E.U. ni petis la presejon, interveni siaflanke, por ke la popolkomisaro finfine permesu la transpagon. La interveno de « Peuvag » havis jenan rezulton :

*Moskvo*, 16-X-1930.

*Al Peuvag-Filio Leipzig.*
*Kopio : al administranto de S.A.T...*

*Per jeno, ni informas vin, ke post la insistaj klopodoj de C.K.-S.E.U. kaj dank' al la klopodoj de Peuvag, ni ricevis la permeson por montranspago en la 1931 jaro entute por 10.000 g. markoj por likvido de nia ŝuldo al S.A.T. La transpago komenciĝos de januaro kaj sekvos regule ĉiumonate. Ekster la plano ni, denove dank' al Peuvag, sukcesis ricevi la permeson, ke el tiu sumo, 1.000 g. markoj estu transpagitaj jam en oktobro. Do hodiaŭ per la Ŝtata Banko ni transpagis al vi 1.000 g. markojn, kiun sumon ni petas skribi en la krediton de S.A.T...*

*Sekretario de C.K. S.E.U.*,
Demidjuk.

La oktobra pago alvenis kaj tuj estis ĝirata al la presejo, kiu komencis energie admoni. Sed la promesitaj kaj permesitaj pagoj dum 1931 tute ne okazis!...

**Niaj proponoj por likvido de la ŝuldo.**

Ne ricevante monon, sed konstante admonite de « Peuvag » pri nepra pago de la presŝuldoj, ni proponis interkonsente kun « Peuvag », kies nomo ŝanĝiĝis tiutempe en « Neudrag », ĝiri la sumon al la moskva filio de la presejo. *Tiu procedo neniel povis malfaciligi la valutan situacion de Sovetio, ĉar la sumo restus en Moskvo kaj estus pagata en rubloj.* Tiucele ni donis al la presejo dokumenton, kiu konfirmas la cedon de nia kredito al « Neudrag ». *La transpago estis rifuzata.*

Por provi malgrandigi la sumon ni komisiis al S.E.U., eldoni S.A.T.-librojn en Sovetio, kiuj estu sendataj al ni,

ricevante tiel parton de la ŝuldo per nerekta vojo. Ekzemple ni proponis presigi tie la Jarlibron de S.A.T., kies kostoj ĉiam estis tre altaj. Ni permesis al C.K. S.E.U. laŭplaĉe elekti inter manuskriptoj kaj ne faris iujn kondiĉojn rilate al kvalito k.t.p.

Jen, surprize, sen antaŭaverto al S.A.T., en numero 6 (1931) de « Bulteno de C.K. S.E.U. » aperis anonco pri presita libro *Eŭgeno Onegin* kun akra atako kontraŭ la S.A.T.-Direkcio. La aplombe cinika agmaniero de C.K. S.E.U. pruviĝas per tio, ke la S.A.T.-Administracio ricevis entute 22 ekzemplerojn el tiu libro laŭŝajne de S.A.T. eldonita. Almenaŭ laŭ la teksto, sur la titolpaĝo, oni devas supozi, ke S.A.T. estas la eldonanto... kvankam S.A.T. neniel partoprenis, — krom per sia propra kapitalo, — en la eldono de tiu libro kaj precipe neniam posedis la stokon... escepte la menciitajn 22 ekzemplerojn.

Vidante en « Literatura Mondo » (Budapeŝto) reklamon pri tiu ĉi libro, ni skribis al la revuo, ke la produkton el la vendo oni sendu al nia Lajpciga Administracio. La respondo estis surpriza: C.K. S.E.U. interŝanĝis la t. n. S.A.T.-eldonaĵon kontraŭ libroj de « Literatura Mondo » profite al si! Ne nur ĝi rifuzis pagi al S.A.T. la ŝuldon, sed eĉ utiligis la nomon de S.A.T. por fari proprajn negocojn.

Per tiuj ĉi faktoj la malbonvolo transpagi al ni la monon ricevis sian lastan pruvon. Dum la Amsterdama Kongreso la opozicio finfine forĵetis la maskon kaj deklaris malkaŝe, ke oni ne *volas* repagi tiun ĉi sumon, kaj eĉ pli, oni kulpigis la S.A.T.-Direkcion, esti uzurpinta la gvidadon kaj forrabinta la organon kaj la tutan havaĵon!...

La situacio estis klara. La forrabo de la S.A.T.-mono estis decidita afero.

**Per helpo de tribunalo.** Kiam nia Lajpciga presejo « Neudrag » certiĝis, ke ĝi ne plu povas esperi ricevi pagon el Moskvo por nia presŝuldo, kiu tiam atingis 3.643.59 markoj (proks. 22.000 fr. frankoj), ĝi subite ekpostulis de ni la tujan pagon de la tuta sumo, sin turnante por ĝia akiro al la tribunalo. Fakte tiam S.A.T. staris antaŭ la bankroto, kaj nur dank' al la monhelpo de kelkaj Kamaradoj, kiuj saltis en la breĉon kaj pruntis monon ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne repagitan, la celo de la skismuloj en tiu momento ne estis atingita.

La samaj komunistoj, kiuj tiom malŝate prijuĝas la klasan socion, ne malŝatis servigi al si ĝiajn tribunalajn instituciojn por provi faligi proletan organizon. La Administranto de

S.A.T., paginte la restoŝuldon al « Neudrag », direktis prave al tiu komunista presejo tiun ĉi « adiaŭan » leteron :

« *Leipzig*, 15. *okt*. 1931.
(Adreso)

« ...*En decembro plenumiĝas la deka jaro, depost kiam ni komisias al vi la presadon. Dum tiu ĉi tempo ni ĉiam akurate plenumis niajn pagdevojn kaj eĉ ofte donis al via entrepreno krediton. Via « proletara » sinteno rilate al proletara organizo tial mirigas nin despli. Ni kredas, ke tian traktadon ni ne meritis de via flanko, kaj tial informos nian internacian membraron pri tiu ĉi afero.*

(*Subskribo*) »

Por tute kompreni la monan situacion de S.A.T. en tiu momento, oni devas scii, ke ni tiutempe ne nur havis la pro fido je la Moskvaj pagoj akumuliĝintan ŝuldon ĉe « Neudrag » (t. e. ĉ. 22.000 fr. fr.), sed plie ŝuldojn de proks. 46.000 fr. frankoj ĉe Pariza presejo *Polgar* (por libroj), ĉe privataj Kamaradoj investintaj kapitalon en S.A.T., k. a. kreditoroj.

Aliflanke necesas aldoni, ke tiam ni havis en Leipzig kaj Paris kvin geoficistojn, al kiuj ni devis pagi salajron. Ne volante konduti kontraŭ ilin kiel farus kapitalista firmo, ni ne tuj maldungis tiujn, kiuj fariĝis ne plu necesaj pro la perdo de la tuta Sovetia klientaro kaj de relative multaj membroj, kiujn naŭzis la tuta disputo.

Nedubeble tiu pagpostulo fare de la komunista presejo okazis laŭ instigo de Moskvo; tie oni ja esperis, ke S.A.T. bankrotos kaj ke la nove starigita skisma eldonejo « Ekrelo » povos por kelkaj pfenigoj aĉeti aŭkcie la administracian materialon. Alivorte : kio ne povis esti atingata per honesta, laŭstatuta vojo, tio estus kaptita per tiu makiavela plano.

## LA SKISMO

LA DECIDOJ EN MOSKVO. La jam kelkfoje aludita skismo farita de la Kompartianoj estis decidata en Moskvo dum kunsido de C.K. S.E.U. la 7.-8-30. Pri ĝi aperis la protokolo en *Sennaciulo* de 16-10-30 :

« g) *Jam nun ne atendante oficialiĝon de la eldonejo opinii necesa organizi ĉe G.L.E.A. specialan aparaton sufiĉe reklamatan por disvastigi eksterlande eldonojn kaj gazetojn de S.E.U.*

« h) *Fari ĉion por ke en 1931 en Moskvo okazu internacia kongreso de revoluciaj esperantistoj por oficialigi novan revolucian organizon.* »

La unua punkto de tiu ĉi projekto komencis baldaŭ realiĝi. Fondiĝis « Ekrelo », librejo en Leipzig, kaj en oktobro 1930 aperis la unua numero de la opozicia gazeto *Internaciisto*, kies celo estis prepari la definitivan organizan memstariĝon de la opozicio. *S.A.T.*-anoj alvokas la membraron al bojkoto de S.A.T. kaj ĝiaj organoj kaj libroj, starigis organizon kun la celo detrui la malnovan Asocion kaj disvastigis alarmajn mensogojn pri S.A.T. kaj ĝia gvidantaro — mensogojn tiom abundajn, ke ne estis eble kontraŭstari al tiu torento da malico. Kelkaj ekzemploj de tia misinformado kaj mensogado.

#### « S.A.T. NE SENDAS GAZETOJN AL SOVETIO. »

La ekzisto de S.A.T. postulis, ke en tiu momento, kiam ni ne plu povis ricevi monon el Sovetio, ni devis ĉesigi la akcepton de *novaj* abonoj. Ni *akcentis*, ke ni finliveros la kurantajn abonojn, kvankam eĉ tio kaŭzis al ni pluan perdon. Sed kio okazis? La senditaj gazetoj al niaj abonantoj en Sovetio ne alvenis! La praktiko de C.K. de S.E.U. estis tre simpla mekanismo : Ĝi denuncis al la poŝto sovetia, ke la S.A.T.-organoj estas « kontraŭ-sovetiaj » kaj per tio atingis, ke ili estis konfiskataj dum oni kredigis al la S.A.T.-membroj en Sovetio, tute ekskluzive dependaj de la informfontoj de S.E.U., ke estas S.A.T., kiu ĉesigis la liveradon kaj tiel volas rezigni pri la sovetia membraro. Feliĉe la sovetia poŝto mem donis al ni la dokumenton necesan por senmaskigi la malican insidon : En *Sennaciulo* n-o 340 aperis kliŝa reprodukto de reveninta banderolo rekomende adresita al K-do Izgur, Kremenĉug, kun la indiko « Retour, non admis » (returne, ne allasita). Cetere ni posedas multajn tiajn banderolojn kaj eĉ leterkovertojn, kiuj revenis kun tiu mencio de la poŝto.

#### LA S.A.T.-DIREKCIO UZURPIS LA GVIDAN POSTENON EN S.A.T.

Uzurpi signifas senrajte proprigi al si povon. Sed la funkcio de la Direkcio en S.A.T. baziĝas sur laŭstatutaj procedoj. Neniu kongresa Dokumento, neniu referendumo malaprobis la raportojn de la Direkcio. Male ĝia agado ĉiam estis aprobata dum kongresoj kaj per referendumo kun granda plimulto. Krom la aserto la opoziciuloj neniam alportis faktan pruvon pri la nelaŭstatuta funkcio de la Direkcio. Sed la opozicio

mem neniam uzis la laŭstatutan vojon por ŝanĝi la Direkcion. La koncerna paragrafo de la Statuto havis tiutempe jenan tekston :

32. Same almenaŭ 1/10 el la anaro rajtas postuli la okazigon de ĝenerala voĉdono pri propono prezentata de alia 1/10 kaj akceptata de la Komitato. Tiu iniciato estos ankaŭ publikigota en la presorgano, sed la ĝenerala voĉdono funkcios nur se almenaŭ 100 aliaj anoj ĝin postulos en templimo de 60 tagoj post la publikigo.

Tio estis la laŭstatuta vojo, sed la opozicio, kvankam ĝi asertis, ke la plimulto sekvas ĝin, neniam provis surpaŝi tiun vojon. Anstataŭ eluzi la eblon, kiun permesis la Statuto, la opozicio aranĝis « referendumon » *ekster* la kadro de S.A.T., manipulante laŭ principoj, kiuj neniel estis kontroleblaj, eĉ voĉdonigante personojn, kiuj ne estis anoj de S.A.T., ĉar ili ne pagis kotizojn.

**S.A.T. SIN DEFENDAS.** Sekve de tiuj agoj kontraŭ la Statuto, precipe per bojkotado de l' S.A.T.-organoj, per alvoko ne ĝiri monon al la Administrejo, per intenca malutilo al nia Asocio, la Plenumkomitato konsente kun la Kontrolkomitato eksigis tri el la plej respondecaj membroj, inter ili *E. Drezen,* kaj anoncis, ke ĉiuj, kiuj aktive partoprenas la skisman entreprenon, suferos la saman sorton.

La Plenumkomitato donis al tiuj statut-malobeantoj du-monatan templimon por pripensi sian agadon kaj estis preta ne apliki la disciplinan regulon al Kamaradoj, kiuj deklaros, ke ili sin detenos partopreni la skisman agadon.

**SOVETIAJ S.A.T.-ANOJ SUB TERORO.** C.K. de S.E.U. per longa cirkulero ruslingva kun la dato 31-a de oktobro 1930 donis instrukciojn al siaj membroj, por ke ili ĉiel kontraŭbatalu la Direkcion de S.A.T. El la ok punktoj de tiu cirkulero la 7-a estas tre karakteriza kaj citinda. Jen ĝi estas :

> « *Eltrovi kaj senmaskigi la adeptojn de Lanti inter la Sovetia Esperantistaro, metante la postulon pri la eksigo el S.E.U. de la plej obstinaj el ili...* »

Tio klare montras, konsidere la Sovetiajn cirkonstancojn, ke neniu sovetia Kamarado povis eldiri malkaŝe sian aprobon pri la gvidado de l' Direkcio de S.A.T. Ni tamen scias tute certe, ke la grandega plimulto da Sovetiaj S.A.T.-anoj staris ĉe nia flanko, kiel atestas jena cito el letero inter multaj aliaj, kiujn ni posedas :

> « *...Miaopinie vastaj amasoj ne povas aprobi la agadon de l' K-doj E. Drezen k. a., kiuj sole, nure mal-*

*helpadis al S.A.T. per tuta sia nuna agado. Eldonaĵoj de C.K. S.E.U. estas uzataj por kontraŭbatali la gvidadon de S.A.T. kaj ĉiujn ne povantajn konsenti kun ĝenerala sekretario de C.K. S.E.U... Laŭtaj vortoj iliaj tute finfine ne malhelpos al S.A.T.-anoj veraj kaj bonpensantaj plenumi sian devon antaŭ Revolucio kaj Proletaro.*

*« Kiel vicperanto mi tute aprobas vian konduton kaj deziras longan daŭron de viaj gvidado kaj laborado. »*

**La fondo de I.P.E.**

**« Ŝturmu al Amsterdam! ».**

Per ĉiuj streĉitaj fortoj kaj per larĝaj antaŭpreparoj la opozicio projektis lastan atakon kontraŭ S.A.T., okaze de la Kongreso en Amsterdam. Ne estas eble citi tie ĉi ĉiujn fazojn de tiu Kongreso, kiu estis tiom instrua, ne nur pro la tie klare elmontrita senbazeco de la akuzoj opoziciaj, sed ankaŭ pro la persona sinteno de la opoziciuloj, kiu fornaŭzis multajn, eble simpatiintajn iomete kun ili. Tiu ĉi sinteno, nur komparebla kun tiu de stratbuboj, donis antaŭguston al ĉiuj, kiuj eble imagis, ke Asocio direktita de *ili,* povus levi la nivelon de la Asocio al pli alta ŝtupo. Ne estis mirinde, ke ankaŭ en tiu Kongreso la opozicio plene fiaskis, dum la Direkcio denove ricevis fid-esprimon de la plimulto el la Kongresanaro. La preskaŭ dramecajn scenojn oni legu mem en la Protokolaro de tiu Kongreso. Ĝi enhavas krom tio multajn detalojn pri la konflikt-kaŭzoj, trenantaj jam de longa tempo.

La opozicio forlasis la Kongreson kaj kunvenis en alia ejo en la sama urbo por fondi sian propran skisman organizon, kies strukturo kaj funkcioj jam de longa tempo estis preparitaj.

Kun la foriro de la opozicio, historia etapo en la vivo de S.A.T. finiĝis kaj la ŝipeto de la laborista esperantistaro povis esti riparata en haveno de pli trankvila tempo. Estis komprenebIe, ke la pseŭdorevolucia sinteno de la opozicio, kies aktiveco direktiĝis preskaŭ ekskluzive kontraŭ la laborista asocio S.A.T., konfuzis multajn aktivulojn sincere kredantajn, ke la nove fondita I.P.E. povus plenumi multe pli da revoluciaj taskoj kaj tiel servi pli bone al la klasbatalanta laboristaro. La foriron de tiuj Kamaradoj ni sincere bedaŭris, ĉar ilin gvidis *bona volo,* kvankam ili fariĝis viktimoj de artifikuloj.

## LUKTANTE KONTRAŬ LA HIDRO...

MULTMILIONULO S.A.T.-ANO 16.570.

Ne estas eble, en kadro de nura broŝuro, refuti la abundon da mensogoj, kiuj estas sisteme disvastigataj pri S.A.T. El la arsenalo de la mensogo ni ĉerpu nur la plej evidentajn kalumniojn, por montri plej draste la metodon de tiuj samklasanoj, kiuj invitas S.A.T. al unueca fronto. Regule ripetiĝas en la I.P.E.-organoj la aserto, ke S-ro Archdeacon, efektive milionulo, estas S.A.T.-ano. En la jaro 1931 li fakte anoncis sian aliĝon al nia administranto en Lajpcig, kiu ne konante lin, senkritike akceptis kaj registris lin. Kiam la Direkcio en Parizo eksciis pri tio, ĝi tuj skribis al S-ro Archdeacon, demandante, ĉu li efektive agnoskas la Statuton de S.A.T., laŭ kiu la organizo estas klasbatala; tiam S-ro Archdeacon ne plu insistis pri la S.A.T.-aniĝo kaj malaperis el niaj vicoj same rapide, kiel li venis. Ĉiu aserto kontraŭa al tiuj faktoj sekve estas simpla, evidenta mensogo.

LA LABORISTA ESPERANTISMO.

Malmultaj Kamaradoj scias, ke la manuskripton de tiu ĉi verketo de K-do Lanti aprobis, antaŭ la presado, diversaj Kamaradoj, kiuj hodiaŭ en I.P.E., kondamnas la tezojn tie formulitajn. Eĉ Kamarado el Sovetio trovas ĝin tiel trafe verkita, ke li ne petas ian ajn ŝanĝon. Kaj post la apero la aŭtoro ricevis de Sovetiaj Kamaradoj multajn gratulajn kaj aprobajn leterojn. Al K-do Glodo, kiu tiutempe ankoraŭ apartenis la Kompartion, iu germana, tre ortodoksema sampartiano skribis interalie jenon pri la malpermeso importi la broŝuron en Sovetion :

> *« ...Mi sincere konfesu, ke ankaŭ mi miras pri tiu malpermeso. Mi persone do ne konsentas, sed ne emas disputi pri tiu afero kun S-ro Drezen. Ĉu por li estis decidaj taktikaj momentoj, aŭ ĉu li per tio alcelas ion alian, mi ne scias. Sed mi estas konvinkita, ke nome li estas la iniciatanto de tiu malpermeso... Certe ne ĉio estas tute konsentebla en la broŝuro de Lanti, nome ĉar lin instigis certaj motivoj por la verkado, sed tamen mi ne vidas en ĝi tro danĝerajn frazarojn por la revolucia movado. »*

Sed plej karakteriza sendube estas la fakto, ke unu el tiuj, kiuj plej akre kritikis la gvidadon de Lanti, estas mem laŭdinta la broŝuron antaŭ ol li eksciis, ke en Moskvo oni kondamnis ĝin. Ni citu el la letero, kiun tiu I.P.E.-a korifeo

sendis al la aŭtoro kaj kiun ĉi tiu lasta bonvolis komuniki al ni :

> Mi ricevis danke vian broŝuron "Laborista Esperantismo". Ĝia legado plezurigis min. Kaj ĝi certe estas la plej klara propagandilo de SAT por la perfektiĝantaj esperantistoj kaj ĉefe por tiuj k-doj, kiuj ĝis nun staris for de nia movado pro diroj de kelkaj malkontentuloj.
>
> Frate via
>
> M. Boubou

**S.A.T. « ANTIMARKSISTA ».** Tiu ĉi rekantaĵo ripetiĝas same ofte, kiom la pli-malpli regula apero de la opoziciaj organoj tion permesas. La karaktero de S.A.T., organizo unuiganta en sia kadro Kamaradojn el la plej diversaj klasbatalaj tendencoj, agnoskantaj aŭ ne la teorion de la marksa historia materialismo, havas kiel konsekvencon, ke en la organoj esprimiĝas ankaŭ ideoj, kiuj ne estas konformaj al la marksa teorio. Tio estas tute natura, ĉar S.A.T. por si ne adoptis difinitan doktrinon. Se S.A.T. tion farus, tiam la aliaj Kamaradoj, anoj de diferenca opinio, devus foriri kaj fondi novan organizon. Kaj ĝuste pro tio I.P.E. ne povas esti unueca organizo, ĉar ĝi adoptis difinitan doktrinon. Al ĝi povus aliĝi efektive nur komunistoj aŭ komunistemaj esperantistoj, eĉ ne socialistoj, kvankam inter ili estas ankaŭ marksanoj.

Se en la S.A.T.-organoj aperas artikoloj malpli ol antaŭ jaroj favoraj al la koncepto marksista, tiam la kulpo estas nur ĉe la flanko de la opozicio, kiu starigis sin ekster S.A.T. kaj rezignis pri la tribuno, kiu estis je ilia dispono konforme al la proporcio de ilia anaro.

Por S.A.T., organizo el diverstendencaj Kamaradoj, ne povas ekzisti « marksista », « sennaciista » aŭ kia ajn « ista » gvidantaro, ĉar en tiu sama momento la unueco ne plu estus ebla. La sola solvo nur estas gvidantaro, kiu restas neŭtrala rilate al la diversaj doktrinoj laboristaj kaj penas redukti pasiajn disputojn ĝis objektiva grado, pacigante inter la tendencoj kaj ŝovante en unuan rangon la temojn kaj faktojn, kiuj estas interesaj kaj utilaj por *ĉiuj* tendencoj. Tiu malfacila tasko ne lasas laŭrojn por la gvidantaro, sed ĝi estas nepre plenumenda, por konservi unuecon en la organizo.

**La « Burĝa » Plena Vortaro.** Kiom malzorge oni starigas asertojn, tio evidentiĝas klare per la aserto, ke en la *Plena Vortaro* ne troviĝas vortoj kiel « soveto », « marksismo ». Ĉiu, kiu volas, povas legi sur la paĝoj 437 kaj 304 tiujn vortojn. La lastenomita vorto rangiĝas pro kompost-eraro post « marsejlezo », anstataŭ sub « markoto ». Estas vere, ke « udarniko » kaj « ŝturmi » ne troviĝas en la *Plena Vortaro,* sed ankaŭ ne « lici » aŭ « darfi » kaj ceteraj neologismoj, pri kies akcepto la praktiko tute ne jam decidis. Nur la praktika elprovado decidos en konvena tempo pri la neceso adopti aŭ forlasi tiujn neologismojn.

La riproĉo al S.A.T., ke pastro Rambu (Ramboux) formulis la difinojn de vortoj, rilatantaj al eklezia kaj religia terminaro, estas ridinda, ĉar kiu povus esti pli kompetenta sur tiu kampo ol pastro? Ĉu oni konsultos Hitler aŭ Musolini por formuli la difinojn pri la marksisma terminaro? La scienco postulas *ekzakton* de la difinoj, kaj tendencema difino de vorto ne estas utila por homo pense memstara. La *Plena Vortaro* certe ne jam estas la lasta solvo, cetere ne ebla, ĉar per la kreskanta uzado de esperanto la vorttrezoro ŝvelos proporcie al ĝia uzado en la fakaj aplikoj. Multaj fakoj ne jam tute posedas la necesan terminaron, ekzemple la filozofio, la ekonomio, k. a. Per konstanta kunlaboro de la esperantistaro oni atingos tiun ĉi celon nur iom post iom. Nenio estas perfekta kaj utiligi kompreneblajn mankojn de scienca verko por kontentigi demagogiajn bezonojn, tion rezervis al si la reprezentantoj de I.P.E.

**« S.A.T. perdis sian proletan karakteron. »** En la organoj de I.P.E. oni jam ofte antaŭanoncis la morton de nia organizo. « Baldaŭ la lasta proleto forlasos S.A.T. », tiel formuliĝis la profetaĵo; tiu ĉi montriĝis kiel nura deziro, al kiu la realo tute ne respondas. Kontraŭe al I.P.E., S.A.T. publikigas regule, ĉiun jaron, adresliston de S.A.T.-perantoj kaj tiel liveras al la publiko la materialon por kontroli mem la situacion de nia membraro. Ni ne blufas, nek fanfaronas, nek laboras en la malhelo, sed sentime submetas la organizan situacion al la juĝo de la esperantista publiko. Ni povas tion fari, ĉar ni konscias pri la *kvalito* de nia membraro, kiu absolute libervole kaj neniel devigite per ekstera premo venas al S.A.T. Tiu ĉi libervola aliĝo estas la plej granda garantio por la pluekzisto de nia Asocio, kiu tiel estas apogata de fidela kolektivo plena de reciproka komprenemo kaj toleremo, konforme al la celo de la organizo.

## KONKLUDO

Depost la ekzisto de I.P.E., ĝiaj gazetoj dediĉis preskaŭ la pli grandan parton al malica batalo kontraŭ S.A.T.-on kaj K-don Lanti (kvankam tiu Kamarado eksiĝis el sia gvidposteno, ne volante, ke ial ajn lia persono povu esti kaŭzo, malebliganta rekuniĝon de l' fortoj). Tiu farmaniero de I.P.E. sendube estas konforma al la devizo, ke la aliaj klasbatalaj organizoj *nekomunistaj* estas la plej grandaj malamikoj.

Kiu volos laŭforte kaj serioze studi la historion pri la skismo en la laborista esperantista movado, tiu nepre alvenos al jenaj konstatoj :

1. La fondintoj kaj gvidantoj de S.A.T. ĉiam agis laŭstatute, lojale kaj en la intereso de la Asocio;
2. Ĉiam la kompartianoj celis, ke S.A.T. estu gvidata laŭ la *ŝanĝiĝema* taktiko de Komintern;
3. Kiam ili perdis la esperon atingi tiun celon per laŭstatuta vojo, tiam ili provis detrui S.A.T.-on per makiavelaj, nepre kondamnindaj rimedoj;
4. Per tio ili nur kaŭzis gravan domaĝon al la tuta movado, dissemante dubon, konfuzon kaj malfidon en niaj vicoj.

El tiuj konstatoj oni devas konkludi, ke la laborista esperantista movado povas fariĝi forta kaj agokapabla nur per agnosko kaj obeo al la principoj, kuŝantaj en la Statuto de S.A.T.

Oni povas rigardi ĉiujn flankojn de l' problemo de la unueco, ĉiam vidiĝos, ke por ebligi kaj certigi unuecon en nia movado, ne ekzistas aliaj principoj, ol tiuj, kiujn alprenis la fondintoj de S.A.T. — kaj kiuj estis aprobataj dum preskaŭ dek jaroj de plej diverstendencaj Gekamaradoj inkluzive la fondintojn de I.P.E. Kiuj deziras sincere la kuniĝon de ĉiuj laboristaj esperantistoj en unu solan organizon, tiuj devas agnoski tiujn principojn kaj ilin apliki.

Certe oni povas starigi plurajn demandojn rilate al la praktika funkciado de la Asocio. Oni trovos eble ankoraŭ pli bonajn formojn por certigi senfrotan funkciadon inter la diverstendencaj grupoj. Ĉio ĉi devus esti fiksita en senmanka regularo, kies rigora apliko, sub la observo de la gvidantaro, estas necesa. Sed sen reciproka komprenemo kaj toleremo, sen laŭebla objektiveco kaj respekto antaŭ la personoj, la komuna laboro devus pli-malpli frue fiaski kaj devus reĵeti la laboristan movadon en la saman staton malfacilan, en kiu ĝi troviĝas hodiaŭ.

Per esperanto al la senklasa socio!

LA PLENUMKOMITATO DE S.A.T.

# HAVIGU AL VI LA VERKOJN, KIUJ INFORMAS VIN PRI CELOJ, TASKOJ KAJ EVOLUO DE LA LABORIST-ESPERANTISTA MOVADO

Laborista movado E-a antaŭ la mondmilito (G.P.de Bruin) **
Historio de SAT (1921-1952) **
El Verkoj de E. Lanti : *
1.- For la Neŭtralismon!
  - La Laborista Esperantismo
  - Absolutismo
  - Herezulo - Herezaĵo
  - Adamaĵoj
El Verkoj de Lanti :
2.- Artikoloj, paroladoj, leteroj (1937-1946) *
Manifesto de la Sennaciistoj (Lanti) **
Naciismo (Lanti) *
Leteroj de E.Lanti (ĝis 1937) *
Vortoj de E. Lanti *
Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti - Ivon) *
Vivo de Lanti (Borsboom) **
Mia vivo (Bartelmes) *

* Havebla ĉe SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris
kaj ĉe : SAT-Broŝurservo, Esperanto, FR-47470 Beauville

** Havebla ĉe SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris

Presis : Baudé - FR-47470 Beauville